# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

5, Quai Vauban, **PERPIGNAN** (P.-O.) - Telefono 34-38-84

-o-o-o- Numero 8a -o-o-o-o- (Trimonata Bulteno) -o-o-o-o-o- 4-a Trimestro 1 9 6 2 -o-o-

- GRAVA EVENTO ! - LA NACIA KONGRESO DE ESPERANTO (1963) OKAZOS EN PERPIGNAN. -

Dum la Pentekostaj Festoj 1963, okazos en Perpignan la 55-a Nacia Kongreso.

La tasko estas grava, ĉar PERPIGNAN estas la urbo en kiu loĝas la Prezidanto de nia Nacia Movado, kaj la urbo el kiu eliris tiu grava sukceso de la enkonduko de Esperanto en la Seminariojn.

Kaj oni ne povas organizi etan, sed egan kongreson.

Ekster la laboraj kunvenoj de la Kongreso, la Organiza Komitato cerbumas por trovi allogajn aferojn.

Perpignan estas la urbo de la "Sardane"; do, dum la sabata vespero, niaj gekongreŝanoj povos aŭdi "Cobla" (=kataluna orkestro), kaj vidi l'"Esbart dansaïre del Rossello " (dancistoj) kun lokaj kostumoj, kaj la "Sardane" estos honorigata.

Ni gustumos la mondfaman vinon "BANYULS" kaj vizitos la ceramikejon "Sant-Vicens", (verkaĵoj de la famekonataj artistoj Lurçat, Miro.)( La lasta estas esperantisto kaj havis la unuajn premiojn en diversaj eksterlandaj ekspozicioj, interalie en Nederlando.)

La dimanĉon okazos arta vespero, kun partopreno de la "Gajaj Trobadoroj". Nia Prezidanto prezidas ankaŭ tiun folkloran societon. Partoprenos ankaŭ komedia trupo de la Konservatorio.

Dum la Pentekosta Lundo okazos ekskurso en Hispanujon, tra la "Costa Brava", ĉe la blua maro tiel ŝatata de la turistoj.

Sekvos la vizito de la fama greka urbo "Ampurias".

Kiel vi povas konstati, la programo estas interesa kaj tre alloga.

---

PASKA 1 9 6 3 KULTURA SEMAJNO en "Grésillon"

Sub respondeco de Samideano René LIECH-WALTER, okazos denove en nia kastelo "Grésillon" grava Kultura Semajno, de la 1-a de Aprilo ĝis la 7-a de Aprilo 1963. Jam promesis partopreni : D-ro. ALBAULT (Okulfrapa prelego !), Jean THIERRY (Poeto, prenu cian liuton kaj min donu kison !) Pierre PETIT (la eterna translanda vagabondo-filmisto) René BLANC, (lumbildamanto !) kaj aliaj konsilantoj de "U.E.F." Pedagogiajn temojn pritraktos niaj invititoj, profesoroj LAPENNA, BABIN kaj BEAU. Eksterlandanoj ankaŭ intencas partopreni tiun gravan kulturan semajnon.

Ne forgesu sendi vian aliĝon sufiĉe frue al nia sindonema amiko MICARD, en EPINEUX-LE-SEGUIN, (Mayenne). Bonvolu noti ke, dum la Kultura Semajno de Pasko 1962, ne estis eble loĝi ĉiujn partoprenintojn en la kastelo mem, ĉar alvenis pli ol cent aliĝoj!

Atentu ! De la 8-a ĝis la 15-a de aprilo 1963, okazos lernrestado de la Popolaj Universitatoj.

Kiel membro de "U.E.F.", vi povos partopreni, ĉar "U.E.F." aliĝis al la Franca Asocio de la Popolaj Universitatoj.

Ni antaŭvidas en "Grésillon" eksterordinarajn Paskojn 1963.

---

-- ESPERANTO EN KOMERCO -- Samideano Bruno VOGELMANN kolektis raportojn de komercaj entreprenoj kiuj, por eksterlandaj rilatoj uzas Esperanton, kaj eldonis tre utilan libron, sub la titolo "ESPERANTO EN KOMERCO". Samideano E.L.M. WENSING, Vic-Prezidanto de "U.E.A.", Direktoro de la Departemento de la Medicinaj Instrumentoj ĉe PHILIPS, skribis la enkondukan paĝon.

Raportis favore gravaj firmaoj : GEVAERT, FOIRO DE BARCELONO, FIAT, AUTOSTRADA TORINO MILANO, ITALA KOMERCA BANKO, PHILIPS, k.t.p. ...

Eldonis la raportojn "Esperanto-Rondo" en Crailsheim (Germanujo) - Gratulojn ! -

---

-o- URĜA ALVOKO -o- La Nacia kaj Internacia Junularasocio de "METILERNANTAJ MUELEJOJ" (Moulins des Apprentis) el Piot apud Chéniers (Creuse) serĉas familion kies edzo povus gvidi tiun ĉefkolonion, kaj plie, esti rivergardisto. La edzino, krom la kuirado povus havi sekretarian laboron (maŝinskribado) en la Asocio, dum la malbona sezono. Preferinde, oni dungos geesperantistojn parolantajn franclingve. (Skribi al Esperanto-Federacio de Centra Montaro 58, Avenue des Landais, Clermont-Ferrand (Puy de Dôme)

- KONSILOJ POR LA GRUPOJ. - Baldaù aperos la franclingva broŝuro "CONSEILS AUX GROUPES," sed tamen, ĉar ni estas nun fine de septembro, estas bone insisti pri la propagandmetodoj, ne ĉar ni kredas nin kiel profeto, sed, ĉar ni havas la sperton de la jaroj.

En la lastaj tagoj de septembro aù komence de oktobro, estas necese organizi kunvenon dum kiu, la ĉefa punkto de la tagordo devos esti "Organizado de la propagando celanta al la malfermo de la kursoj." Estas necese sciigi al la publiko ke esperanto-kurso funkcios.

Tiucele, ni povas antaùvidi, kaj poste uzi la diversajn rimedojn : rekta propagando de "buŝo al buŝo", konferencoj, presartikoloj, radiodissendoj, afiŝoj k.t.p. ...

De tiuj ĉi supre diversaj rimedoj, la unua, rekta propagando estas eble la plej efika.

Ni devas uzi rektan propagandon ĉe niaj parencoj, amikoj, konatuloj. Ke ĉiu grupano konsideru kiel nepra devo, varbi al nia afero almenaù unu novan membron, kiu riĉigos la nombron de la gekursanoj.

Pri la konferencoj, estas preferinde alvoki eksterurbanon. "Neniu estas profeto en sia propra lando", jam asertis popola proverbo. Se eble, estas bona kutimo organizadi duan parton amuzigan , por allogi la publikon.

Ĉe la enirejo de la prelegsalono, oni organizados ekspozicion kun eventuala vendado de esperanto-libroj, broŝuroj, vortaroj, k.t.p. ...

Estas nepre necese anonci la alvenon de la preleganto , kelkajn tagojn pli frue.

Estas ankaù ĉefa afero inviti oficialulojn, ne forgesante la gazet-delegitojn.

Ĉe la fino de la konferenco, la Prezidanto anoncos la novan malfermon de la kursoj, kaj invitos ĉiujn personojn kiuj tion deziras, fari demandojn al la preleganto, kaj agi senceremonie, sed spontanee.

Oni zorge notos la nomojn kaj adresojn de la personoj kiuj interesiĝis pri la afero, kaj kiuj, eventuale, sekvus la kursojn.

Kelkafoje, estas interese kapti ne rekte la publikon ; ekzemple, mi havas prelegon titolita "Au Pays de Chopin et de Zamenhof", kun diapozitivoj. Estas memoraĵoj pri la Kongreso de Varsovio kaj la ekskurso en Bialistoko. Alia prelego estas titolita "Ĉarmoj de Italujo"; alia, "De la Nebuloj de Nederlando ĝis la Suno de Roussillon".

Pierre PETIT povas paroli kun filmoj kaj diapozitivoj pri la Popolaj Universitatoj Vojaĝoj al Orientoj, k.t.p. ...

André RIBOT zorgas speciale pri la lernejoj, sed, laùokaze, li povas prelegi antaù alia publiko.

Alia bona vojo estas peti la lokan Popolan Universitaton aù Kleran Asocion ke ĝi bonvolu organizi prelegon pri Esperanto.

Tiamaniere, ĉeestos jam la kutima publiko de la organizanta asocio, plus la publiko alvokita de la Kultura Centro de Esperanto.

Niaj amikoj LENTAIGNE kaj CAPUS, el Montpellier, pretigis seriojn da diapozitivoj kun sonbendo. Temas pri Ekspozicio de Esperanto.

Mi jam parolis pri tio en "Franca Esperantisto", kaj dum la lasta Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago.

Estas fakte tre bona propagandmetodo, ĉar oni ne bezonas prelegiston. La prelego estas gravurita sur la sonbendo. Oni bezonas nur magnetofonon kaj projekciilon.

La gazetaro oferas al ni tre efikan propagandrimedon, konsiderante ke la apero de presartikoloj estas tute senpaga.

Oni profitos la okazon de konferencoj, malfermoj de kursoj, kongresoj, k.t.p. ... por komuniki multajn presartikolojn.

Bona metodo estas tajpi la artikolojn en multaj ekzempleroj, kaj transdoni unu el ili al ĉiuj ĵurnaloj, sen iu ajn konsidero al politikaj nuancoj.

La artikolojn kiujn oni sendas al la gazetaro oni bonvolu ankaù komuniki al la Stacio de Radiodissendo de la koncerna urbo, aù de la plej proksima, sed precipe, al la Stacio la plej bone aùdebla.

La propagando per afiŝoj estas ankaù interesa, sed sufiĉe multekosta. Oni povas tamen, mendi taùgajn afiŝojn al "U.E.F." kaj peti la komercistojn de la urbo, ke ili bonvolu, almenaù dum du aù tri semajnoj, lasi ilin sur la vitre enireja pordo de la magazeno. - Jen kelkaj konsiloj. - Kompreneble, oni uzu ilin, laù eble, sed estu ĉiam la zorgo fari ion digna, serioza, kaj, kiel eble plej altnivela. Kaj nun, kuraĝe ellaboru.

- René LIECH-WALTER. Prezidanto de "U.E.F" -

---

- ESPERANTO-KLUBOJ EN LA LERNEJOJ. - Post la konsento de la estro de la Lernejo, oni povas krei Esperanto-Klubon, same kiel ekzistas kinaj-kluboj. Oni vekas la intereson de la junaj lernantoj starigante estraron, donante al ili la specialan karton kiu donas al ili membrecon en nia nacia kaj internacia movado. Kotizo : 3 NF. jare, kun abono al la franca parto de "Revue Française d'Esperanto" kaj "Sudfranca Stelo".